

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



**Nina
Vinnikova**

[N. Altajsk, Ruslando]

somero simila al paradizo

2001

kiel Detlev Blanke, tre konata kaj multfaceta persono el Germanio iĝis esperantisto — literatur-historiaj paĝoj — ironie pri Esperanto — fabeloj — aforismoj — pri proverboj kaj distre anekdotoj — anoncetoj — informoj — korespondu!

4

Perantoj de KOMENCANTO

ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio
Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Per tiu ĉi kajero ni fermas la unuan duonon de 2001 kaj malfermas someron per desegnaĵo de *Nina Vinnikova*.

La gasto de la 3-a paĝo estas *Detlev Blanke*, ege konata esperantisto el Germanio.

“Budapeŝta skolo” kaj “Literatura Mondo” estas objektoj, kiujn ni prilumas ĉe la literatur-historiaj paĝoj. Ambaŭ ili estis dense interplektitaj kaj ludis gravan rolon en E-literaturo.

Ĉe la mezaj paĝoj vi trovos ironiajn fabeletojn de *Rudolf Zoldoŝ* kaj *Bill Thorne* pri nia kara lingvo. Povas esti, ke multaj el vi foj-foje trafis similajn situaciojn.

Sur la paĝo 8 ni revenas al la temo de fabeloj, lanĉita en la 2-a kajero. Poste kutimas Aforismoj, Anekdotoj, Anoncetoj kaj korespondemuloj, kies paĝon gajigas figuro de kato Kotofeiĉ, serĉanta korespondantinon.

Agrabla legadon!

Viaj DONACOJ por KOMENCANTO
estás ĉiam bonvenaj!

KOMENCANTO

2001 numero 4 // 8 numeroj jare
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2001:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo \$11;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA. vkud-a

ruslanda tarifo: 100 рублей (za 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича:

620041, Екатеринбург, а. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el “K”

La sola kondiĉo - nepre menciigi KOMENCANTO'n kaj la nomojn de la aŭtoroj kun ties loglokojn.

Kiel tio komenciĝis

estrarano de "Centro por Esploro pri la Monda Lingvo-Problemo", ĉefredaktoro de "der esperantist", membro de la Komitato de UEA, aktivulo de Mondpaca Esperanto Movado...

Detlev Blanke

... sen la lingvo mi certe ne havintus tiom interesan vivon

Karaj amikoj! Detlev Blanke havas multajn postenojn en E-movado kaj danku 'al ĝi vivas interesan vivon!



La aŭtoro inter 1968-1991 estis ĉefsekretario de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA), redaktis la revueton "der esperantist" (de kiu de 1965-1990 aperis 164 kajeroj), de 1976 ĝis 1997 estis membro de la Komitato de UEA, iniciatis en 1978 la serion de esperantologiaj konferencoj kadre de la Universalaj Kongresoj, krome dum jardekoj aktivadis en Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Paralele al lia profesia laboro en la Esperanto-movado li havis sciencistan karieron. Per du disertacioj li doktoriĝis kaj habilitiĝis (universitata instrujto) pri temoj ligitaj al Esperanto, fariĝis ŝtate nomumita honoraria docento pri interlingvistiko en Humboldt-Universitato en Berlino, kie li ankoraŭ lekcias. Li verkis kelkajn sciencajn librojn kaj multajn studojn kaj diverstipajn artikolojn. Lia bibliografio entute notas ĉ. 1600 publikaĵojn.

Detlev Blanke aktuale estas estrarano de "Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo", por kiu li redaktas la "Informilon por Interlingvistoj". Li estas membro de la redaktaj komitatoj de la revuoj "Language Problems and Planning" kaj "Esperanto Studies - Esperantologio". Li prezidas la germanan sciencon "Societon pri Interlingvistiko".

Kiam mi estis 16-jara (en 2001 mi fariĝos 60-jara) en la gimnazio de norda urbeto de Germana Demokratia Respubliko

(GDR), iu samklasano montris al mi lernolibreton de al mi antaŭe nur laŭ la nomo konata lingvo. Mi interesiĝis pri la afero kaj komencis aŭtodidakte eklerni la lingvon.

Min tamen helpis tre interesa persono. Temis pri simpla homo, la masonisto Franz Tisher el Magdeburg, kiu venis el la laborista E-movado. Pro diversaj sortobatoj li povis viziti la lernejon nur dum tri jaroj kaj ne kapablis skribi eĉ unu seneraran frazon en la germana. Sed li ja kapablis skribi tute senerare en tiu por mi nova lingvo. Tio fascinis min. Li daŭre kaj obstine korektis miajn leterojn kaj traduktaskojn. Al li mi dankas miajn unuajn paŝojn en Esperanto.

Fine de la 50-aj jaroj Esperanto en GDR ne estis rekte malpermesita (lingvon oni ne povas malpermesi), sed ja estis malpermesita organize agadi por aŭ per Esperanto. Mi tion ne tre atentis, gvidis kelkajn kursetojn en la gimnazio, informis pri la lingvo, aranĝis ekspoziciojn kaj poste en la universitato de Rostock organizis (1963) la unuan interlingvistikan seminarion en GDR kun interesitaj profesoroj kaj studentoj. Mi eksciis pri la klopodoj atingi la repermeson de Esperanto-organizaĵo en GDR. Tio fakte okazis en 1965, kiam oni fondis Esperanto-organizaĵon en Kulturligo, vaste akceptata kaj grava kultura organizaĵo.

Kiel junulo mi rapide komencis nodi internaciajn leterkontaktojn (eble siatempe korespondis entute kun esperantistoj el pli ol 30 landoj, hodiaŭ mankas la tempo...)

Mi nodis kontaktojn kun spertaj esperantistoj en GDR, multe aŭtostopis tra la lando kaj pli kaj pli trempiĝis en la ankoraŭ ne leĝe akceptitan Esperanto-movadon de GDR. Do, kreskis en mi la deziro iel helpi al la plena reoficialigo de Esperanto en GDR.

Sed ne nur tiuj aspektoj min interesis. Jam en la lernejo kaj en la universitato (mi studis pedagogion kaj germanan filologion) oni ĉiam

denove diris al mi, ke la lingvo estas artefarita kaj morta, ne povas evolui, ne posedas esprimilojn por nuancoj ktp. Mi tamen daŭre spertis la malon. Tio fakte vekis mian kontraŭstaron kaj internan proteston. Mi do komencis serĉi en la fakliteraturo materialojn pri la problemo de artefariteco, serĉis science bazitajn materialojn pri Esperanto kaj per tio pli kaj pli enprofundiĝis en la sciencajn aspektojn ne nur de la lingvo Esperanto sed ĝenerale en la problemojn de t.n. artefaritaj lingvoj (la scienca termino estas "planlingvoj").

Miajn unuajn praktikajn kontaktojn pere de Esperanto mi havis en 1961, al hungara amiko en Budapeŝto. En la jaro 1963 dum tri semajnoj mi sole aŭtostopis tra Pollando, uzante nur esperantistajn kontaktojn. Sekvis multaj aliaj vojaĝoj, kontaktoj, belaj travivaĵoj.


Retrorigardante mi estas tre kontenta, ke mi povis iom realigi mian junulan revon, kontribui al la reoficialigo de la Esperanto-movado de GDR. Ja de 1968-1991 mi estis ĉefsekretario de GDREA kaj kiel vicprezidanto ĝi partoprenis la unuiĝon kun Germana Esperanto-Asocio. Ekde la 90-aj jaroj mi pli intense daŭrigas miajn sciencajn aktivecojn, kiujn mi komencis en la jaro 1976 per mia doktora disertacio pri Esperanto (fakte pri vortfarado), la unua en la du germanaj ŝtatoj entute.

Demandate de la redaktoro pri io nekutima, gaja, mi ne sciis, kie komenci. Pere de Esperanto mi havis tiom multajn nekutimajn kaj interesajn travivaĵojn, inter ili abunde gajajn, ke sen la lingvo mi certe ne havintus tiom interesan vivon. Do, mi ne bedaŭras la lernon de la lingvo kaj la engaĝon por ĝi.

Detlev Blanke

La 2-a periodo de esperanta literaturo

Budapeŝta skolo *Literatura Mondo*



Dum dudek jaroj hungaria ĉefurbo Budapeŝto estis la centro de intensa intelekta aktiveco, kiu grave influis nian literaturon, riĉigis ĝin per pluraj ĉefverkoj kaj eĉ ĝis nun efike disradias. Plejado de riĉe dotitaj beletristoj, energie kapabla eldonisto kaj forta loka movado kune kreis escepte favorajn cirkonstancojn. Elkreskis la "skolo" ligita al la revuo kaj eldonejo "Literatura Mondo". Tiu skolo signas kulturalan tendencon, senteblian ankaŭ ekster Hungario kaj eĉ trans difinita periodo.

La "skolo" alportis novan manieron senti kaj pensi literature. Rompinte kun la diletantismo, ĝi fervore kultis estetikajn valorojn, evoluigis la esprimmetodojn, perfektigis la poezian teknikon ĝis senprecedenca grado, rezervis aparte indan lokon al la poezio, provizis la publikon per didaktaj libroj kaj levis la recenzan kritikon ĝis alta nivelo. Oni povas diri, ke "la budapeŝta skolo" instruis al tuta generacio la arton ĝue legi.

La ĉefaj reprezentantoj de tiu skolo estis J. Baghy kaj K. Kalocsay. Pri tiuj du vi legis en la antaŭaj kalendaroj de "K"-2001. Sed krom ili fruk-

todone laboris kelkaj personoj, kies nomoj kutime apartenas al la budapeŝta skolo.

Karlo Bodo

K. Bodo (1903-1963), hungaro, oficisto, esperantisto de 1921. Respondeca redaktoro de "Literatura Mondo" (L.M.) en ĝia dua periodo. Eminentaj proza tradukisto, amplekse kunlaboris por la proza parto de "Hungara Antologio" (1933). Siajn unuajn tradukojn li kontribuis por L.M. (unua periodo). Lin karakterizas trafĝusta elekto de tradukindaj verkoj kaj naturstila rekreo de la originalo, tiel ke ĝi ŝajnas nova originalo. K. Bodo brile esperantigis "Nordan Venton" de F. Karinthy en 1926, kaj la romanon de Babits "La Cikoni-Kalifo" en 1929. Ĉefkunlaboranto de la "Enciklopedio de Esperanto".

Francisko Szilagy

F. Szilagy, (1895 - 1967), esperantisto de 1924. Kunredaktoro de "Literatura Mondo", li komencis sian verkistan karieron en la budapeŝta skolo: liaj poemoj aperis en "Dekdu poetoj". Lia "Trans la Fabeloceano" estis eldonita de L.M. Antaŭ la dua mondmilito li elmigris en Svedion. La plej gravan parton de sia literatura agado li disvolvis en la tria literatura periodo. Tre bonrezulta E-instruisto, en 1932 li instruis laŭ memverkita lumbild-metodo, poste gvidis sukcesajn kursojn. (En Svedio, dum unu jaro 20 kursoj kun ĉ. 500 kursanoj!).

Lajos Tarkony

Lajos Tarkoni (*L. Totsche*; 1902-1978), hungaro, ŝtataficisto de finanĉministerio, esperantisto ekde 1919, poeto kaj konata recen-

zanto, kunredaktoro de "Literatura Mondo" kaj ĝia suplemento "Lingvo-Libro". Liaj poemoj aperis en L.M. kaj "Dekdu poetoj" (1934). Multajn recenzojn li verkis, kritike pristudis multajn ĉefajn verkistojn postmilitajn. Li strebis, ke la kritiko mem estu literatura formo. Verŝajne lia inspiro al kritika laboro venis el funde lirika naturo de L. Tarkony. Por karakterizi lin kiel kritikisto tre taŭgas frazo de Anatole France: "...la bona kritikisto estas tiu, kiu rakontas la aventurojn de sia propra animo inter la majstroverkoj". L. Tarkoni estis neordinare kapabla tradukisto, kiu povis reprodukti stilnuancojn, "aromon" de la originalo. En la originala poezio li estis pasia amanto de belo, li prikantis intimajn emociojn, poezion de ĉiutago...

Krom poezio kaj kritiko li kunlaboris por la "Enciklopedio de Esperanto".

Literatura Mondo

Neŭtrala literatur-arta revuo aperanta en Budapeŝto. Ĝia fondinto estis d-ro T. Schwartz, kiu eldonis la revuon kaj estis ĝia respondeca redaktoro de okt. 1922 ĝis sept. 1924. Poste la eldonon transprenis Hungara E-Instituto (d-ro V. Toth). Ĝiaj redaktoroj estis J. Baghy kaj K. Kalocsay. Malgraŭ la multaj kaj diversnaciaj kunlaborantoj kaj elstare valora enhavo la revuo pro ekonomiaj malfacilaĵoj ĉesis aperi en apr. 1926.

La revuon refondis en 1931 Vilhelmo Bleier, energia, kompetenta kaj riskema administranto, kiu samtempe kreis eldonejon sub la sama nomo "Literatura Mondo". Ĉefredaktoris denove J. Baghy kaj K. Kalocsay, respondeca redaktoro iĝis Karlo Bodo kaj redaktoris Lajos Tarkony kaj Francisko Szilagy.

Kunlaboris en "Literatura Mondo" plej vaste internacia verkistaro. L.M. estis debutejo por la nova generacio de poetoj kaj verkistoj. Plej ŝatataj estis observoj kaj objektivaj detalaj kritikoj. Ankaŭ la naciaj numeroj - estona, pola, ĉeĥa, jugoslava, latva, sveda...

La formato ĉiam estis 30x23. En la unua periodo aperis entute 838 paĝoj. En la dua 830 paĝoj. De 1933 la revuo havis kvaronjaran suplementon "Lingvo-Libro". J. Baghy ekŝiĝis en jan. 1933 pro la personaj kaj principaj motivoj.

"Literatura Mondo" aperis ĉiam en arta eksteraĵo kun multaj ilustraĵoj. La revuo ĉesis aperi en 1939 pro la milito. Ĝi reviviĝis jam post la milito en 1947 denove sub la redaktado de J. Baghy kaj K. Kalocsay, sed tio estas jam la Tria periodo de E-literaturo kaj ni rakontos pri ĝi siatempe.

Ne estas facile taksi la signifon de "Literatura Mondo" por la E-literaturo, sed oni povas certe aserti, ke ĝi dum jardekoj estis la pulmo, per kiu spiris la plej viva parto de niaj literaturistoj.

Eldonejo

Literatura Mondo

En la dua periodo la eldonejo "Literatura Mondo" estis la plej aktiva E-eldonejo. Dum ĉ. ok jaroj ĝi sukcesis aperigi 80 volumojn kaj inter ili kelkajn el la plej signifaj verkoj de nia literaturo. V. Bleier trovis la vojon al la publiko, lerte spitis financajn malhelpojn kaj valutajn barojn ĝis la pleja limo de ebloj. La celo de la eldonejo estis helpi la eldonon de la unuaj verkoj de novaj verkistoj kaj tiurimede kreskigi la originalan literaturon. En 1933 eldonejo L.M. fondis Asocion de Esperantistaj Libro-Amikoj. Inter la verkoj eldonitaj de L.M. estis ĉiuj verkoj de K. Kalocsay kaj la unua eldono de la "Enciklopedio de Esperanto" en 1933. Pri la aktiveco kaj laboro de la entrepreno bone informas nin ĝia senpaga katalogo de 1934 - tiu katalogo estis la plej bela kaj plej impona el ĉiuj tiuspecaj presaĵoj.

Lajos Tarkony

Triopa trista gard'

Okupas ĉambron la vesper'
En marŝo mola,
Envolvas ĉion sorĉa ret'
Silent' viola.

Al antipod' jam kuras la
Purpura sun-kaleŝ',
Mallaŭte zumas vent-vagul'
Tra la krepuska freŝ'

De foje ondas tra fenestro
Sonorila tint',
Sur mont' kontraŭa lampoj vibras
Serpente ĝis la pint'.

Dancigas ombrojn sur la muro
La stratlanterna bril',
Fendas la nigron de l' ĉielo
Arĝenta lun-falĉil'.

Silento, solo kaj vespero:
Triopa trista gard'.
Ve, vane serĉas ion, iun
Post montoj la rigard'.



La pensoj ĝermas, velkas
Kaj dronas en la mut'
Kaj pasas la senhalta Temp'...
Ĉu horoj? Ĉu minut' ?

Jen, nokton krias ie la
Horloĝ' kukola,
Dolor ekveas en la kor',
Ĉar sola.

1931

Maria Terjofina
[JULJANOVSK, Ruslando]

Julio Baghy

Estas mi esperantisto

1933

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla fundamento".
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.

Polkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas.
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
"Bonan tagon! Ĝis revido!"
Ĝi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikas,
la gvidantojn dome pikas
kaj konspiras kun persisto
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
sed nenion mi oferas.
Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento.
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
ŝi'aros "rondo familia",
nekrologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.

Mallongaj fabeletoj...

Pri fabeletoj okupiĝis kaj skribis:

Rudolf Zoldoŝ [KANJIZA, Jugoslavio]

IOM IRONIE PRI

Ni lernu Esperanton!


Forpasis jam du monatoj, de kiam li komencis la studadon de Esperanto. Li perfekte ellernis la lingvon kaj sekve... li devas fariĝi esperanta verkisto-poeto, nepre poeto, ĉar Esperanto estas mirinde oportuna por poetoj: oni ne devas, ekzemple, longe serĉi rimojn, estas nur necesa ellerni perfekte la sufiksojn, kelkajn sufiksojn... La samideano kuras en proksiman butikon, aĉetas dikan kajeron, provizon da inko kaj plumoj, altabliĝas kaj verkas esperantan himnon: "Vivu nia kara Esperanto".

Vivu nia kara Esperanto.
Mi estas via geamanto!
En la tuta mondo li nun disvastiĝis,
Ĉiu prudentulo nun al li aliĝis,
Ektriumfis multe tuta homaro,
Ĉar ĝi ekfariĝis granda amikaro!
Ĉiu nune vivos en la amikeco,
Forgesinte tute pri la malpaceco.
Ĉiu nia nuna kontraŭbatalulo
Estas sendispute granda malsaĝulo ...ktp

La talenta poeto dum unu vespero plenigis kelkajn paĝojn de sia kajero kaj tra-leginte sian laboron, trovis nur tri eraretojn: li dufoje nomis Esperanton "li" anstataŭ "ĝi" kaj sin mem "geamanto".

Jam post unu monato dikega libro estis preta, li nur ne povis trovi entrepreneman homon, kiu aperigus lian sterkon... , pardonu, mi volis diri "verkon"! Nu, kion fari? Tia estas la sorto de ĉiuj veraj talentoj en la nuna ne kultura epoko...

Sed tamen — ni lernu Esperanton!



Jurij Perevalov, [LESNOJ, Ruslando]

Bill Thorne, [LONDONO, Britio]



HO! NUN MI KOMPRENAS!

Korespondanto

En poŝtofiĉejo mi renkontis mian amikon Lukas, kiu antaŭnelonge fariĝis flama esperantisto. Sur la ĉapelo li havis la verdan rubandon kun granda verda stelo kaj kun skribaĵo "Esperanto". En la kravato estis pinglo kun stelo, en la butontruo de l' surtuto ankaŭ stelo. Li ĝoje salutis min:

— Bonan tagon, sinjoro! Kiel vi fartas?

Mi volis laŭ kutimo saluti lin per manpremo, sed ambaŭ liaj manoj estis troplenigitaj per korespondaĵoj, kiujn li komencis ŝovi ĝen leterkeston. Mi kalkulis: estis sepdek tri leteroj kaj poŝtkartoj.

— Kio ĝi estas?

— Ho, kara amiko, ne demandu! Estas la respondoj al gesamideanoj. Mi sendis mian adreson al 68 gazetoj kaj nun mi ricevas centojn da leteroj kaj poŝtkartoj, kiujn mi devas respondi. Li forprenis la ĉapelon kaj forviŝis la ŝvitojn per la stelumita naztuko kun surskribo "Esperanto".

Mi ne sciis, kion respondi kaj diris:

— Jes, la laboro ne estas facila, sed... sed la fruktoj estas agrablaj... Tamen, ĝis la revido!

— Unu momenton! - li diris per petanta voĉo. — Ĉu vi ne havas korespondanton sur la insulo Borneo? Vidu, mi havas unu sur Javo, apud Borneo, sed...

Mi forkuris...

NIA KARA LINGVO

Bill Thorne

[LONDONO, Britio]

Ŝlimulo

Mi ege ŝatas aferojn, kiuj estas senpagaj; do, mi ĝojis kiam oni diris, ke estas eble aranĝi malmultekostajn feriojn alilande per Esperanto, kaj estas ege facile. Oni devas nur lerni iom da ĝargono kaj interŝanĝi leterojn.

Mi do mendis senpagan postkurson, kaj trovis ĝin sufiĉe facila. Anstataŭ la mian, mi uzis la adreson de nia loka gastejo por junuloj, dirinte al ili ke mi loĝas tie. La kursinstruisto estis pedanta intelekta idioto, sed mi sendis al li la respondojn, kiujn mi volis. Post la lecionoj, mi trovis korespondanton, kiu aspektis sufiĉe riĉe, kaj ni interŝanĝis poŝtkartojn, kaj mi mensogis kaj diris, ke lia (aĉa) urbo vere interesigas min, kaj ke mi vere dezirus vidi ĝin.

Li tuj invitis min viziti lin, kaj diris, ke li gastigos min tute senpage kaj montros al mi la urbon. Ekzakte tiel, kiel mi volis.

Mi vojaĝis per kamionoj, (pro problemoj pri mia pasporto), unu urbon post la alia. Bona krimulo paciencas.

La hejmo de mia nova amiko estis luksa kaj agrabla. Li kaj liaj edzino kaj filinoj bonvenigis min, babilante senĉese. Ili estis tute fidemaj. Stultuloj. Dum la semajno ili ĉiuj foriris por labori kaj devis lasi min sole, kaj esperis: "Ĉu mi estos en ordo dum ili estos for?" Mi respondis:

- Ne gravas, mi estas kontenta esti en fremda lando, mi lavos la telerojn ktp...

Nu, dum ili forestis, mi bone serĉis tra la domo por vidi, kion ili havis. Mi legis iliajn leterojn kaj trovis iliajn ĉeklibrojn. Mi skribis notojn pri la kontnumeroj, por kiam mi estos hejme kaj povos fabriki duplikatajn kreditkartojn. Mi trovis grandan valizon malplenan kaj memoris kie ĝi estis...

La semajnfino alvenis, kaj mi devis suferi la tedan turneon tra la stultaj butikoj kaj frenezaj preĝejoj. Tamen, mi sukcesis sekrete ŝteli du malgrandajn mansakojn el

restoracio; mi ekprenis la monon, kaj ĵetis la sakojn en la rubujon ekstere. Tial, mi povis aĉeti donacetojn por miaj gastigantoj, kaj ili multe dankis min.

Lerte, ĉu ne?

Mi povis kompreni ilian lingvon, sed mi ŝajnis ke ne — nur iom da Esperanto — do, mi ne diris tro pri mia hejmvivo. Ili kredis, ke mi loĝas ĉe la gastejo. Unu el la filinoj komencis instrui min en sia lingvo, kaj estis ege malfacile subteni la impreson, ke mi scias nenion pri ĝi. Ankaŭ, ĉar mi komencis iĝi tro intima kun ŝi, estis saĝe, ke mi revenu hejmen baldaŭ.

La familio diris, ke ili intencis veni por adiaŭi min ĉe la fervoja stacidomo, je la vespero post la laboro. Pro tio, antaŭ ol ili hejmenvenis, mi prenis la valizon kaj plenigis ĝin per la plej bonaj brikabroj — radio, sonbendoj, diskoj, eĉ libroj kaj vestaĵoj. Tiam mi hastis al la ĉefa vojo el la urbo por trafi kamionon, iun ajn kamionon, por eskapi antaŭ ol ili trovis, ke ilia karega hejmo okazis prirabita.

Jes, mi laŭdas Esperanton, kaj nun mi serĉas pli da fervoraj korespondantoj. Do: kontaktu min, mi petas — ĉe la gastejo por junuloj. Kompreneble.




Kompilis kaj prilaboris **A.N.Tolstoj**
Esperantigis **Jelena Jeroŝenko** [VOLGODONSK, Ruslando]

Rusa popola fabelo

Kokino bunta



Vivadis-estadis iam avo kaj avino, ili havis kokinon buntan. Elmetis la kokino oveton nekutiman: buntan, akran, ostan... Metis ĝi la oveton en angulon sur la benkon. Museto preterkuris, per la vosto svingis, la oveto falis kaj rompiĝis.



La avo ekploris, la avino ekploreĝis. Kokinoj ekflugis, la pordego ekknaris, polvo sub la piedoj ekfumiĝis, la barilo disfalis, la tegmento de l' kabano ekŝanceliĝis...

Sed la Kokino Bunta al ili diras:

— Avjo, ne ploru, avinjo, ne ploreĝu. Kokinoj, ne flugadu. Pordego, ne knaradu. Polvo sub la sojlo, ne ekfumiĝu. Tegmento de l' kabano, ne ŝanceliĝu. Elmetos mi al vi alian oveton. Buntan, akran, ostan... Oveton ne ordinaran — oran.

Ilustris la fabelon
Snejana Kononova, [N. OMKA, Ruslando]

Esperantigis **Margarita Zujeva**
[MOSKVO, Ruslando]

Franca fabelo

Tri ĉasistoj

Vivas-estas tri ĉasistoj. Du iras nudaj, sed la tria ne estas vestita. Ĉasistoj havas tri pafilojn. Du pafiloj ne estas ŝargataj. La tria pafilo ne havas ŝargajon. Ĉasistoj eliris el urbo tagiĝe kaj iris malproksimen, malproksimen, malproksimen kaj ankoraŭ pli malproksimen. Apud arbaro ili mortpafis tri leporojn kaj du el ili preterlasis. Kaj la tria leporo de ili forkuris. Ili metis ĝin en poŝon al tiu ĉasisto, kiu ne havis veston.

— Ah, Dio mia, - diris li. Kiel ni kuiras tiun leporon, kiu de ni forkuris?

Kaj jen tri ĉasistoj denove ekiris vojon. Ili iris malproksimen, malproksimen, malproksimen kaj ankoraŭ pli malproksimen. Lastfine venis ili al domo sen muroj, sen tegmento, sen pordego, sen fenestroj, sen ĉio. Tri ĉasistoj tri foje laŭte frapis en pordon: Tuk! Tuk! Tuk! Mastro, kiu forestis hejme, respondis:

— Kiu estas tie? Kion vi volas?

La pafistoj respondas:

— Estu afabla, faru por ni komplezon, pruntu al ni poton por kuiri tiun leporon, kiu de ni forkuris.

— Ah, Dio mia, amikoj, mi havas nur tri potojn, sed du ne havas fundojn, sed la tria taŭgas por nenio.



Jurij Perevalov,
[LESNOJ, Ruslando]

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco

{N.Neksin}

AFORISMOJ

Esperantigis el la angla

Tatjana Zavjalova

[ARĤANGELSK, Ruslando]

Neniam permesu, ke
malluma pasinteco nubigu
lumhelan estontecon.

*

Persono estas neniam
tiel malplena, ol kiam li estas
plena nur de si mem.

*

Vi povas doni sen ami,
sed vi ne povas ami sen doni.

*

Kiam problemo pli-
grandiĝas, via karaktero aperas

*

Vera amo atendas
nenion interŝanĝe.

*

Mono estas bona
servanto, sed malbona mastro.

Esperantigis

Margarita Zujeva

[MOSKVO, Ruslando]

Homo pri multo parolas
interese, sed kun apetito —
nur pri si mem.

(Ivan Turgenev)

*


Homo, kiu ne povas regi
sin mem, ne estas uzebla por
regi la aliajn.

(U.Penn)

*

Vera elokvento konsistas
en tio, ke parolu ĉion, kio
estas necesa, sed ne pli.

(F. Laroŝfuko)



Ĉiuj ni ne por ĉiuj
okupoj egale estas taŭgaj.

(Propercij)

*

Supermezura sateco
pereigis pli da homoj, ol
malsato.

(Teognid, la 6-a jarcento antaŭ
nia erao)

kolektis kaj esperantigis

Hussein Amili

[LONDONO, Britio]

Afableco estas lingvo,
kiun surdulo povas aŭdi, kaj la
blindulo povas vidi.

(Princino Diana)

*

Ĝoju, ke vi ne akiras la
registaron al kiu vi pagas.


*

Kelkaj pensas, ke pers-
isto fortigas ilin, aliaj opinias,
ke rezigno.

*

Civilizacio estas movo,
sed ne stato; vojaĝo, sed ne
haveno.

(Toynbee)



Vladimir Juĉajk

[OSTAŜKOV, Ruslando]

Preterpaŝe

Ne faru ĉion, kion vi povas.

Ne malŝparu ĉion, kion vi havas.

Ne kredu ĉion, kion vi aŭdas.

Ne diru ĉion, kion vi scias.

Ginette Martin

[SAULXURES/MOSELOTTE,
Francio]

Homo estas farita por
feliĉo, kiel birdo por flugado.

(M.Gorjky)

*

Feliĉo estas serĉi ĝin.

(Ju. Renard)

*

Amo estas teatraĵo en
kiu la aktoj estas la plej
mallongaj, kaj la interaktoj
estas la plej longaj.

(Ninon de Lenclos)



Bill Thorne
RIMARO

AGO
blago
flago
frago
imago
lago
papago
tago
zigzago

AĜO
damaĝo
domaĝo
etaĝo
garaĝo
kaĝo
kurtaĝo
masaĝo
mesaĝo
miraĝo
omaĝo
paĝo
plaĝo
saĝo
vilaĝo
vizaĝo

ABO
fabo
kabo
klabo
knabo
silabo
stabo
trabo

Sendis al la redakcio **Yonier Cables Solis** [HOLGVIN, Kubo]
(la aŭtoro ne estis indikita)

Aventuro de muso


Al la gepatroj muso diras:
"En la mondon mi foriras".
En la urbon ĝi promenas,
Al butiko baldaŭ venas.

Kato venas tre subite.
Muso tremas timigite.
"Kato kaptos min, mi scias!
Savu min!" - ĝi laŭte krias.

Iu venas kun kompato
Savi muson de la kato.
Tuj alvenas nur infano
Prenas ĝin per sia mano.



Santi Elena Bullo [MESTRE, Italio]



Irina Sabirova, [KIZILSKOJE, Ruslando]

Li al sia hejmo portas
Tiun muson, ĉar ĝi mortas.
Kaj li metas en la liton
Tiun etan timigiton.

En la lito muso restas,
Baldaŭ ĝi tre sana estas.
Tre dankema ĝi eliras.
Al la hejmo ĝi reiras.

Proverboj de **Vladimir Juĉajk**
[OSTAŜKOV, Ruslando]

- * Flugas papago inter vorto kaj ago.
- * Ne malhelpas kritiko de vera amiko.
- * Kiu tro rapidas supren - rapide falos malsupren.

P	o	r	ĉ	i
a	s	s	i	u
g	r	o	a	f
ŭ	o	d	o	l
a	t	o	r	o

Respondoj al la tasko "Finverku la proverbojn" el la 2-a numero de "K"-2001
Ne doloras frapo sur fremda kapo. Ne ŝovu nazon en fremdan vazon. Tenipo estas valoro simila al oro. La dormo estas bona, se mankas mono. Kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas. Inter generaloj parolu pri bataloj. Ŝatata laboro estas trezoro. Komenco bona - laboro duona. Vigla saĝo - grava avantaĝo. Al ĉiu besto plaĉas sia nesto.
Respondoj al la tasko "Trouv la kaŝitan proverbon"
1. Inter generaloj parolu pri bataloj. 2. Ne ŝovu nazon en fremdan vazon. Ĉe botisto la ŝuo ĉiam estas kun truo.



Rudolf Zoldoŝ

[KANJIZA, Jugoslavio]

— Ĉu vi konas la plej novan metodon de malgrasiĝo el Ĉinio?

— Ne. Kia ĝi estas?

— Oni devas dum tuta semajno manĝi nur supon. Nur per bastonetoj.

En la vesta vendejo.

— Ĉu mi povas provi sur min tiun veston, en montrofenestro?

— Jes, sinjorino, sed ni tamen havas spegulhavas provo-niĉon.

Malsanulo vekigās kaj vidas, ke lin rigardas amikema persona. Kaj li ĝoje demandas:

— Kuracisto, kara mia, ĉu sukcesis mia operacio?

Viro kun agrabla aspekto respondas:

— Jes, la operacio sukcesis, sed mi estas Sankta Petro.

— Kiel vi fartas, kara najbaro?

— Ĉu mi diru, ke mi fartas bone, aŭ mi estu sincera?

Yonier Cables Solis

[HOLGUIN, Kubo]

Jen estas almenaŭ tri aferoj, kiujn oni neniam povas fari:

* iĝi pli aĝa ol via patro

* tuŝi kubut-pinton per viaj dentoj

* eniri dufoje en la saman akvon

Margarita Zujeva

[MOSKVO, Ruslando]

— Mi volas aĉeti tiun pentraĵon de Rembranto. Ĉu vi povas garantii, ke tiu rembrantaĵo ne estas falsa?

— Nia vendejo donas garantion por tri jaroj.

— Sinjoro kuracisto, ĉu estas vero, ke sanon oni ne povas aĉeti kontraŭ mono?

— Kiu diris al vi tiun stultaĵon?

— Sinjoro kuracisto, mi deziras detale esplori mian sanon. De kiu fakulo vi rekomendas al mi komenci?

— De okulisto.

— Kial?

— Ĉar sur mia pordo per grandaj literoj estas skribita: VETERINARO!

Ludmila Kaŝuba

[ŜARAPOVKA, Ruslando]

Petro instruas sian papagon paroli.

— Ripetu post mi: "Mi scipovas paŝi". La papago: "Mi scipovas paŝi".

Petro: "Mi scipovas paroli"

La papago: "Mi scipovas paroli"

Petro: "Mi scipovas flugi"

La papago: "Ne mensogu!".

Du infanoj fanfaronas pri siaj kapabloj.

— Kiam mi estis okmonataĝa, mi jam povis paŝi piede.

— Mi estis pli saĝa - igis la gapatrojn porti min sur brakoj.

Sciencistoj malkovris la genon de timemo. Ili jam delonge malkovrus ĝin, sed ĝi kaŝis sin post la darsoj aliaj geno.



Aleksandr Ŝulepov, [VERĤOTURJE, Ruslando]

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

f-ino *Elena Krjukova*
20 ja., literaturo,
poezio, historio

Majovok, 5 - 51
MOSKVO
RU-109428
Ruslando

s-ro *Everardus Mulders*
montri belajojn por
vizitantoj

Huize de la Salle
Oranjestad, Aruba
Nederlandaj
Antiloj Insuloj

S-ro *Tomas Halenvik*
deziras korespondi
tutmonde

Edwin Berlingsgatan 22
SE - 252 50
Helsingborg
Svedio

s-ro *Jose Tarcisio De Lima*

amika korespondado
Rua. Rio Tocantins 1364,
Jardim Iracema,
BR-60340-110
Fortaleza -CE
Brazilo

S-ro *Klaus Kamer*
58 ja., poŝtovicisto, int:
filozofio, religioj, meta-
fiziko kaj astrologio

Schutznenstr. 44
AT-6020
Innsbruck
Aŭstrio

f-ino *Maria C. Mendosa*
internacia amika
korespondado

Gaspar 1, Manz, 6Sta
Cruz Amiros,
MEX-71226
Infonavit, Oaxaca
Meksiko

Jurij Perevalov, [LESNOJ, Ruslando]



s-ro *Dan Levitan*
seriozaj temoj de
korespondado

Lovholmsv. 65
SE - 117 65
Stockholm
Svedio

s-ro *František Šmid*
intersanĝo de uzitaj
poŝtmarkoj, 50:50

Budejovicka 345,
CZ-46008
Liberec 8
Ĉeĥio

s-ro *Benoit Dukasse*
veturi, vojaĝi, reciprokaj
familiaj vizitoj

73 rue Edouard Vaillant
FR-93100
Montreuil
Francio

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

KSM celas havigi al petantoj korespondantojn laŭeble konformajn al iliaj deziroj. Ĉiu koresponemulo rajtas senpage enskribiĝi. Ĉiu individuo (aŭ grupo) kiu deziras rekte ricevi adreson, aldonu du Internaciajn Respondkuponojn (IRK). Por simple ricevi informojn kaj aliĝilon bv. sendi unu IRK.

Por ricevi korespondantojn oni donu jenajn informojn: 1. Familia nomo. 2. Persona nomo. 3. Viro aŭ ino. 4. Edz(in)o: jes/ne. 5. Aĝo. 6. Profesio. 7. Scio de esperanto: bona/meza/iometa. 8. Kompleta klare skribita adreso. 9. Dezirata nombro de korespondantoj. 10. Preferata sekso/aĝo. 11. Preferata(j) lando(j). 12. Dezirata(j) temo(j). 13. Subskribo. 14. Dato.

Komisiito de UEA pri KSM s-ro *Francois Xavier Gilbert*
B.P. 6, FR-55000, Longeville-enBarrois, Francio
TTT: perso.libertysurf.fr/kosomo

Rana Abedian
30 jara fraŭlino (komencantino)
serĉas korespondantojn en
Usono kaj Kanado. Ŝatas legi,
turismi k.a.

P.O.Box 64815-439,
Andimeshk
Irano

s-ro *Renato O. Pereira*
spiritismo, diversaj
temoj, desegnado

Rua Ibikui 55/201;
Bl. 2,
BR-90810-060
Porto Alegre - RS
Brazilo

Viaj donacoj por KOMENCANTO
estas ĉiam bonvenaj. Dankon!

